

Verschiĝnt maandelijks
Negentiende jaargang
Nummer 4 (214)
APRIL 1952

Vertegenwoordiger in Nederland:
L E E N
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
postrek. 34563 van P. M. Mabeoone
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTENBOND
POSTBUS 342, BRUSSEL
Postrekening 2321.50 van V. E. B.
Dolfijnstraat 13, Antwerpen

LIDGELDEN:
* Leden: 75 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonende leden: 25 fr.
(* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN:
België: 60 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

ESPERANTISTOJ ORGANIZITAJ KAJ NEORGANIZITAJ

Ofte kaj prave oni plendas pri la fakto ke tre multaj esperantistoj forlasas nian movadon post kelkaj aŭ pluraj jaroj da aktiveco. Ili ĉesas doni ne nur siajn fortojn, sed ankaŭ sian financan subtenon. Ofte okazas, ke en la daŭro de la tempo la intereso de la homoj ŝanĝiĝas aŭ etendiĝas al aliaj terenoj kaj ne ĉiu havas la kapablon altiri al si novan agadkampon, samtempe restante aktiva sur alia tereno. Inter esperantistoj la meza bontato ne estas pli granda ol inter ne-esperantistoj kaj ĉar niaj adeptoj troviĝas speciale inter homoj, kiuj ĝenerale interesiĝas pri la problemoj de la mondo, ilia listo de kotizoj kaj abonoj estas sufiĉe granda. Se prave aŭ malprave oni opinias, ke kelkaj elspezoj estu forstrekataj, oni elektas tiujn, kiuj ne forrabas multon de la persona ĝuo. Aktiva esperantisto neniam forstrekos el sia budĝeto la kotizon al la asocio, sed tiu, kiu jam dum jaroj malviglis, ne multe suferos pro tia decido. Sen unu el la kaŭzoj de la fakto, ke la nombro da organizitaj esperantistoj estas nur frakcio de la tuta nombro.

Esplorante la statistikon de tiuj, kiuj partoprenis en Esperanto-ekzamenoj oni estas mirfrapata de la fakto, ke proksimume triono de la kandidatoj ne estas membro de iu ajn organizo. Ili lernis la lingvon, verŝajne kun la intenco ĝin uzi, sed rifuzas plivastigi la eblojn de uzado kaj eĉ rezignas la okazon praktiki la lingvon en esperantista rondo. Preskaŭ same senracia estas la ekzisto kaj fondo de lokaj grupoj, kiuj ne aliĝas al landa kaj internacia organizoj.

Esperantisto havas celon kaj ĉar tiu celo rilatas al internacia kontakto, li bezonas internaciajn kontaktojn. Kaj ĉar izoluloj kaj malgrandaj grupoj ne imponas registarojn kaj aŭtoritatulojn, nek povas fari efikan propagandon, nek eldoni librojn kaj gazetojn, estas memkompreneble, ke estas nepre necese, ke ili organizu sin en landaj kaj internaciaj organizoj. Esperantisto, kiu ne partoprenas la movadon estas komparebla kun posedanto de telefonaparato, kiu ne estas ligita al la urba, landa kaj internacia telefonaj retoj.

Personon, kiu lernis Esperanton kaj ne aliĝis al Esperanto-societo oni apenaŭ povas nomi esperantisto. Ne uzante la pli vastan kontakton li vegetas kaj baldaŭ malaperos. Profitante la rezultatojn, kiujn la organizoj akiris, sed ne subtenante tiujn per mona kaj morala helpo, li parazitumas.

Por esti potenco, la Esperantomovado devas kolekti ĉiujn disponeblajn fortojn kaj ne povas permesi al si ke izoluloj ne kontribuu al la fukiado de la maŝino. Ili estas samtempe la radoj

GRAVA KOMUNIKO PRI NIA KONGRESO

Pro diversaj teknikaj cirkonstancoj, i.a. grava malsaniĝo de la kongresa sekretariino kaj ankaŭ pro la konsiderinde pli malalta kostonivelo en Nederlando, la ĉefestraroj de F.I.L.E. kaj L.E.E.N. interkonsentis aranĝi la duan komunan kongreson ne en Antwerpen, sed en Rotterdam.

DUA KOMUNA KONGRESO

F.I.L.E.-L.E.E.N.

31/V 1952—2/VI 1952

ROTTERDAM

Sekr. s-ro J. M. J. Driesen, Sam. Mullerstr. 7a, Rotterdam, tel. 39196.
Kas. f-ino P. Oosthoek, Bree 49a, Rotterdam, poŝtkonto 584804.
Reprezentanto por F.I.L.E.: s-ro C. Meeus, kasisto de F.I.L.E., poŝtkonto 232150 Vlaamse Esperantistenbond.

UNUA KONGRESA BULTENO:

En la hilversuma kongreso s-ro J. Telling proponis nome de la du roterdamaj sekcioj Rotterdam kiel kongresurbon por 1952. Ĉar la plano okazigi la komunan F.I.L.E.-L.E.E.N.-kongreson en Antwerpen ne povas efektiviĝi, la ĉefestraro de L.E.E.N. turnis sin al tiuj sekcioj, memorante la supre menciitan inviton.

La kongresarango estas por la roterdamaj sekcioj granda honoro sed peza tasko. Ĉar restas nur kelkaj semajnoj ĝis la 31-a de majo. Tamen ili akceptis la inviton prepari la duan komunan kongreson kaj elektis lokan komitaton de tri personoj: s-ro J. Telling, prezidanto, f-ino P. Oosthoek, kasistino kaj s-ro J. M. J. Driesen, sekretario.

La sukceso de nia laboro estas ne nur roterdamana afero, sed afero de nia tuta membraro. Pri tio certe konsentas ĉiuj niaj membroj kaj la komitato estas konvinkita, ke ĉiuj kunlaboros kiom eble. Speciale ni urĝe petas informi nin pri grupoj aŭ personoj, kiuj pretas kunlabori per ia prezentado dum la festarangoj. Ni estos dankaj pro ĉia helpo, ĉar la kongreso devos esti sukcesplena por niaj unuigoj, ankaŭ kiel esperantista festo.

Vi multe helpos per tuja aliĝo. Bonvolu pleniĝi la aliĝilon *senprokraste*, samtempe pagante per la ĝirkonto 584804 de la kasistino, f-ino P. Oosthoek, Bree 49a, Rotterdam-Z. Menciuri sur la maldekstra slipo de la ĝirbileto, ke la pago rilatas vian aliĝon.

Kongreskotizo ĝis 31/4 g. 3,50 (b.fr. 45) post 31/4 g. 4,- (b.fr. 50).

La komitato tuj eklaboris luante taŭgan salomon. La kongreso okazos en „Old Vienna“, Proveniersstraat 52, en la centro de la urbo. Multaj tramlinioj estas tute apude. La Centra Stacidomo D.P. elirejo Spoorringel estas je kelkminuta distanco. Ni povas disponi pri la salono de sabato je la 14-a h. ĝis post la dimanĉvespera balo. Diversaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj estos haveblaj je moderaĵaj prezoj.

Provizora programo:

Sabaton:

14-18 Akcepto kaj disdono de la kongresdokumentoj.

20-24 Interkonatiga vespero.

kaj la fonto de la puŝanta energio.

Sekve ni direktu niajn klopodojn pliampleksigi per propagando nian movadon ne unualoke al la granda publiko, sed antaŭ ĉio al la granda aro de neorganizitaj esperantistoj, kies morala devoteco estas okupi aŭ reokupi sian lokon en niaj vicoj.

H. J. B.

PER HAKILO ONI NE TRANĈU!

Tiu vesperon mi alvenis en urbo, kie mi nek konis iun, nek sciis ion, ankaŭ ne la lingvon de la loĝantoj. Kompreneble al UEA-membro posedanta jarlibron kun adreso tio ne devas okazi, sed la situacio iom subite sin prezentis, tiel ke mi ne povis antaŭe informiĝi.

Vidante du junulojn, kiuj aspektis sufiĉe inteligentaj kaj fidindaj por informi, mi demandis al ili kiel trovi hotelon. Ili ne komprenis Esperanton kaj mi devis komprenigi min per la angla lingvo, kiun ili sufiĉe scipovis. Ĉar hoteloj ne estis apudaj, ili gvide akompanis. Kvankam nek la gvidantoj - ankoraŭ lernejoj - nek la vojaĝanto rajtis nomi sin majstroj pri la angla lingvo, la konversacio dum la irado iom prosperis.

Post demando ĉu ili ne aŭdis pri Esperanto, unu el la knaboj rememoris ke la instruisto foje rakontis pri ĝi. Do jen ili renkontis homon, kiu vere scias kaj uzas tiun lingvon, escepte ke li nun uzas la anglan. La minutojn de irado ĝis hotelo mi eluzis por informi pri la internacia lingvo.

„Nu, jen ekzemplo ke la angla tamen montriĝas pli oportuna. Nun vi mem spertis ke per ĝi oni povas ĉiam helpi sin”, iu konato ride diris, „Ĉu ne estas frape ke por propagandi Esperanton al tiuj neangloj, vi devis uzi la anglan lingvon?” Kaj li opinias ke ĉiam tiel restos.

Lia vidpunkto ŝajnas sufiĉe konforma al la realeco. Sendube multaj povus aldoni similajn ekzemplojn, el kiuj montriĝas ke en tiuj okazoj oni pli ofte sukcesas per la angla ol per Esperanto. Kion respondi al tio?

Patro kaj filo Zamenhof skribis en sia proverbaro: Se forestas la suno, sufiĉas la luno. Kaj iu nederlanda proverbo diras: En tempo de urĝo oni senŝeligas terpomojn per hakilo. Se en kazo de nepra bezono oni ne disponas pri celkonforma rimedo, oni apliku alispecan, kiu - kvankam kun multa penado - ebligas ankaŭ atingi la bezonatan rezulton. Do se personoj kun malsamaj gepatraj lingvoj devas ial interrilati, estas tute kompreneble ke ili uzas trian lingvon, ankaŭ se ĉi tiu ne povas esti Esperanto.

Sed tio ne signifas ke oni rigardu tion normala. Ke tre multaj personoj uzas iun nacian lingvon dum internacia rilatado, signifas nur ke ili aplikas malpli taŭgan rimedon, ĉar ili ankoraŭ ne scias serviĝi al si la ĝustan rimedon, t.e. la internacian lingvon. Hakilo estas tre taŭga instrumento por haki, sed se oni havas tranĉilon kaj devas tranĉi, oni ne uzu hakilon por tio. Alivorte oni ne faru ĉiun laboron per nur unu laborilo. Ĉiu instrumento estas adaptita al aparta speco de laboro. Simile pri lingvoj. Oni uzu lingvojn konforme al ilia destino, nacian lingvon en nacia kadro kaj por internaciaj rilatoj la internacian lingvon.

Ni scias ke multaj homoj ne facile konvinkiĝas pri tio ke por internaciaj interhomaj kontaktoj lingvo ekzistas pli taŭga ol unu el la naciaj. Tiajn personojn ni tre ofte renkontas inter tiuj, kiuj neniam partoprenis en internaciaj aferoj, do ne estas tre spertaj pri lingvaj malfacilaĵoj. Guste ĉe tiuj ni trovas multan naivan kredon pri lingvoj. Demandu al skeptikuloj koncerne Esperanton, ĉu ili foje longe kaj funde interparolis kun alilingvulo pri komplika temo. Ĉiu, kiu kelkfoje havis eblon proksime vidi kiel la uzado de fremdaj lingvoj ofte lamas - kaj oni povas puŝigi kontraŭ ekzemploj de tio ĉe funkciuloj kaj ĉe instancoj, de kiuj oni ne atendas tiajn fiaĵojn -, ne plu estas tiom konvinkita ke pli taŭga solvo ol apliko de nacia lingvo ne estas almenaŭ tre bezonata.

Estas homa trajto ke pri siaj fiaĵoj, se ili rezultas el propra nesufiĉa kapablo, oni volonte silentas. Ankaŭ tial la sciado pri netaŭgeco de nacia lingvo en la rolo de internacia lingvo nur malrapide disvastiĝas kaj ankaŭ tial la iluzio pri supereco de iu nacia lingvo

(fino sube en la 3-a kolono)

Dimanĉon:

Se eble diservoj protestanta kaj katolika.

10-16 Jarkunveno; en la paŭzo komuna lunĉo en la kongresejo.

18 Komuna tagmanĝo.

20-2 Festvespero kun balo.

Lundon:

Ekskursoj.

La prezo de la komuna lunĉo estas g. 2,50 (trinkmono enalkalkulita). La prezo de la hotelĉambroj estas indikitaj sur la aliĝilo.

Pri la lundaj ekskursoj informas la aliĝilo.

Ni esploras la eblon fari ekskursojn al la Grandkomerca Konstruaĵo post la jarkunveno, dimanĉon posttagmeze. La granda konstruaĵo estas tre interesa.

Nun ni eklaboru! Bone notu la adresojn de s-ro J. M. J. Driesen, Sam. Mullerstraat 7a (tel. 39196), sekretario L.K.K. kaj f-ino P. Oosthoek, Bree 49a, poŝtkonto 584804, ambaŭ en Rotterdam.

Sekr. L.K.K.

AVERTO

Antaŭ nelonge vizitis min junulo el Paaslo (komunumo Oldemarkt) por peti informojn pri Esp. Li portis verdan stelon kaj parolis kelke da Esp.-vortoj. Poste li kortuŝe rakontis pri malliberigo kaj torturigo dum la okupado, senlaboreco kaj malhavo de mono. La reston vi komprenas. El informoj, ricevita de la komunumestro mi povas konkludi nur, ke ne li, sed mi fariĝis viktimo.

P. W. Baas.

Samspecaj spertoj de aliuloj pravas, ke ankoraŭ ĉiam ekzistas personoj, kiuj senskrupule misuzas la fidon de nia amaro. Avertita homo valoras du!

kompare kun Esperanto povas plu ekzisti.

Sed ni esperantistoj, kiuj interesiĝis kaj scias pri la problemoj de lingvodiverseco, sufiĉe ofte aŭdas kaj legas pri eraroj kaj miskomprenoj en uzado de fremdaj lingvoj. Se ni elmetas tiujn faktajn ekzemplojn en diskuto pri Esperanto, oni ofte respondas al ni rifuzeme: Tion vi rakontas, ĉar vi estas esperantisto, kiu kompreneble deziras ke Esperanto akceptiĝu.

Neniel! Koncerne la celkonsciajn inter ni tiu respondo estas tordigo de vero. Guste inverse ili opinias: Ni estas esperantistoj, ĉar ni scias pri tiuj malsukcesoj de nacia lingvo kiel internacia komprenilo. Ni ne volas tranĉi per hakilo, ĉar ni opinias tion nesaga, se multe pli konvena ilo estas havebla. Kiel internacian lingvon ni senhezito preferas kaj kun bona rezulto uzas la celkonforman lingvon Esperanto.

K. Wilgenhof.

**SOMERAJ KURSOJ
F.I.L.E.-L.E.E.N.**

La someraj kursoj, organizotaj de F.I.L.E. kaj L.E.E.N. okazos 19/VII-26/VII 1952 en konferencio „Het Trefpunt", Ermelo.

En la programo estas menciataj jenaj kursoj:

Konversacia kurso, kiun gvidos s-ro A. Weide, la bonhumora kaj tre ŝatata instruisto, kiu pasintjare rikoltis multan sukceson.

Kurso pri literaturaj temoj, kiun gvidos s-ro A. M. v. d. Wal-Brethouwer, el Arnhem, ekzamenantino en la Ned. Esp. Ekz. Komitato.

Seminaria kurso, destinita por estontaj kursgvidantoj kaj funkciuloj, kiun gvidos sperta persono.

La programo krome mencias diversajn prelegojn, i.a. de s-ro A. v. d. Starre pri la temo: „Cu Bellamy-ekonomio estas utopio?" kaj de f-ino M. H. Vermaas pri Hispanujo aŭ Islando, kun lumbildoj: amuzan vesperon, deklamojn, komunan kantadon, k.t.p.

Diversaj ekskursoj estas planitaj, i.a. al Harderwijk (ŝipekskurso kun vizito al la konstruataj polderigoj), al Elburg, Uddelermeer, k.t.p.

Ni luis la tutan ejon, konstruitan en 1950, kiu havas plurajn modernajn komunajn dormĉambrojn.

Kurskotizo (inkl. de manĝoj kaj trankvilitoj) nur g. 40,-. Minimume la duonon oni pagu tuj ĉe aliĝo en poŝtkonto 70215 de adm. Zomercursus L.E.E.N., Lomanstr. 43, I, Amsterdam-Z.; la reston tuj post alveno en la konferencio.

Se vi volas pasigi agrablan kaj samtempe instruan semajnon en esperantista rondo, vi tuj aliĝu!

Petu detalan prospekton de la administranto s-ro J. Rooker, Lomanstr. 43, I, Amsterdam-Z.

PRELEGO DE I LAPENNA

Rotterdam: Pli ol 200 gesamideanoj, inter kiuj multaj „ eminentuloj " kaj „ gravuloj ", ĉestis la kunvenon, okazintan sabaton 8/3 en „ Beursgebouw, Rotterdam, kie prof. d-ro I. Lapenna laŭ invito de la R-dama kunlaborkomitato prelegis pri la temo „ Kun la partizanoj en la montoj kaj arbaroj de Jugoslavujo ".

D-ro Lapenna komencis sian prelegon, koncize pritraktante la antaŭmilitan

pri la diferencoj rilate la kulturnivelon, grandparte rezultantaj el la fakto ke diversaj popoloj (hungaroj, turkoj, k.t.p.) portempe superregintaj la landon, postlasis siajn spurojn. Ekzistas en Jugoslavujo 5 nacioj, kies anoj parolas diversajn lingvojn kaj estas adeptoj de 13 diversaj ŝtate rekonitaj religioj. Krome regis klasaj antagonismoj, do ne estis facile krei unuecan ŝtaton. La ŝuldoj de la kamparanoj superis la posedaĵojn; la salajroj de laboristoj kaj intelektuloj estis malaltaj. Ne mirige do, ke la malkontenteco de la popolo, kiu dum jarcentoj luktis por la libereco, daŭre kreskis. Oni konsideris la ŝtaton kaj ĝiajn oficistojn malamiko de la popolo kaj kiam en 1941 la registaro aligis Jugoslavujon al la „ akso ", la popolo spontanee ekribelis. Ni ne detale skribos pri la krueleco kaj sadismo de la germanaj invadintoj, pri kiuj d-ro Lapenna citis kortuŝajn, kelkfoje eĉ naŭzajn ekzemplojn. La rezistantaj partizanoj rifugiĝis en la arbarojn, grupigis sin kaj per sabotado malutilis al la malamikoj. Kiam fine la britoj kaj usonanoj alportis helpon, la partizanoj, kies malfacilan sorton d-ro Lapenna detale skizis, disponis pri bone organizita armeo, kiu retenis plurajn malamikojn diviziojn, por ke tiuj ne helpu en aliaj frontoj. En la milito pli ol 1000 esperantistoj trovis la morton. Menciinde estas, ke en 1943 okazis Esp.-kongreso tuj apud la fronto kaj ke diversaj kursetoj estis aranĝataj. Kiam fine Zagreb estis liberigata, la ordo iom restariĝis, kvankam plena libereco ankoraŭ ne regas en Jugoslavujo. Ankaŭ la Esp.-movado restariĝis kaj daŭre kreskis kaj la registaro, kiu komence iom malfavore rilatis al nia movado, antaŭ nelonge ŝanĝis sian sistemon.

Post la paŭzo d-ro Lapenna parolis pri la Centro de Esploroj kaj Dokumentado de U.E.A., pri kiu ni aliloke en nia gazeto raportas.

KOMUNAJ ELDONOJ

Iniciatantoj por la eldono de ĉiuspecaj nederlandlingvaj propagandaj bonvolu interkonsenti pri la teksto kaj eldonkvanto kun la sekretario de Flandra Ligo Esperantista. Per komuna eldono ambaŭ profitos!

U.E.A.

Kontraŭe al sciigo en la antaŭa numero ni devas komuniki, ke laŭregulare sekcioj kaj grupoj ne povas aliĝi kiel individuaj membroj al U.E.A.

LA STUDANTO

Uitwerking van de opgaven in het vorige nummer:

1. Mi sidas sur komforta seĝo antaŭ la fenestro ĉar tie estas bona loko por skribi leteron. 2. Tie la lumo estas bona kaj tiam oni skribas bone. 3. Se estas mallume, estas malfacile skribi klare. 4. Mi volas esti preta por foriri antaŭ la sesa. 5. Ĉu vi estas ege sciivola, por kiu la letero estas destinita? 6. Nu, mi ne estas kaŝema kaj ne havas sekretojn antaŭ vi. 7. La de mi skribota letero estas por mia frato, kiu antaŭ kelke da jaroj foriris al Ameriko.

Matene je la sepa (horo) sinjoro Jansen levas sin. 2. Li lavas sin, razas sin kaj kombas siajn harojn. 3. Poste li kutime nutras sin per telero da kaĉo. 4. Tuj post la matenmanĝo li rapidas al sia oficejo, kie lia (niet sia in het onderwerp!) laboro atendas lin. 5. Kelkfoje lia librotenisto devas rememorigi lin pri diversaj aferoj, sed li streĉas sin por zorge fari sian laboron. 6. Preskaŭ neniam li eraras. 7. Fininte sian laboron li reiras (returnas sin) hejmen kaj ĝojas, ĉar lia edzino intertempe ne enuis. 8. Ĉi tiu rakontas al li, ke liaj infanoj vizitis la naĝejon por bani sin (sin mag hier niet weggelaten worden!) 9. Kelkfoje li miras, ke liaj infanoj ne ĉiam bone kondutas, sed li bone konscias, ke ankaŭ li mem, estante ankoraŭ juna, ne estis bonkonduta knabo kaj ke nur poste lia karaktero evoluis en la ĝusta direkto. 10. Post la tagmanĝo li sidigas sin sur seĝon kaj ĝojigas siajn infanojn, rakontante al ili mirigajn historiojn. 11. Unu el ili mi ankoraŭ bone memoras. 12. Ĝi temis pri giganto, kiu volis venĝi (sin) kontraŭ (je) koboldo, kiu erarigis lin. 13. La giganto iris al la domo de la koboldo, troviĝanta je dukilometra distanco kaj volis ĵeti sin sur lin. 14. La koboldo tamen rezistis kontraŭ sia malamiko kaj venkis lin. 15. Rakontinte sian historion sinjoro Jansen sentas sin laca kaj enlitiĝas.

hof. Esperant— estas bel— kaj praktik— lingv— kaj mi opinias ĝin tre facil— kaj logik—. Mi jam scias mult— vort— kaj per ili povas formi mult— ali—.

Nun mi deziras skribi mi— unu— leter— al an— de la sam— ide— en la eksterland—. Mi legis vi— nom— kaj adres— en anonc— en „Esperant—", la organ— de U.E.A.

Cu vi bonvolas korespondi kun enloĝant— de malgrand— vilaĝ— kaj rigardi min kiel vi— eksterland— amik—? Mi estas 21-jar— librotenist—. Kiomfar— estas vi kaj ki— estas via projeksi—?

Kun malpacien— atendas kaj kore salutis vin vi— samidean— Johan—.

Vertaal:

1. Hij beloofde, dat hij vroeg thuis zou komen om met ons te wandelen.

2. Het is deze nacht buiten niet donker, doordat de straten met sneeuw bedekt zijn.

3. In ons land verandert het weer vaak; nu eens regent het, dan weer schijnt de zon.

4. Ik heb twee vrienden; de oudste spreekt de Spaanse en Italiaanse taal.

5. Om eieren te koken legde men ze vijf minuten in kokend water.

Vertaal:

Een groot geleerde, die vele talen kende en dikke boeken had geschreven, was eens op een feestdiner genodigd in een zeer aanzienlijk huis. Toen hij, die altijd in zijn studeerkamer zat, in de grote zaal kwam, met al die deftige geklede dames en heren, werd hij erg verlegen. Eerst bleef hij in een hoek staan. Toen nam hij een stoel en stootte een dame omver. Hij ging zitten en brak de leuning. Toen hij zich omkeerde wierp hij een tafeltje vol glazen om. Het werd hem zo benauwd, dat hij opstond en wegliep. Toen hij weg was, vroeg men, wie toch die zonderlinge man was. „Wel", zei de gastvrouw, „die man weet in wel 16 talen een stoel

**NIEUWS VOOR
BOEKENLIEFHEBBERS!**

Boekendienst L.E.E.N.

Tweede offerte van nieuwe boeken voor sterk verlaagde prijzen.

Geschikte lectuur voor beginners, afdelingsbibliotheken, enz.

Volledige gebonden jaargang „La Juna Vivo", 196 blz. met een schat van verhalen, toneelstukjes, gedichten, anecdotes, versjes, enz. slechts f 1,10; Sienkiewicz: Kaptitaj en Nubio (vertaald door frato W. v. Zon) f 0,95; Multekolora Libro (uitg. Heroldo), geschikt voor de clubavonden, een verzameling verhalen, geschikt om voor te dragen, anecdotes, artikelen, enz. van f 1,35 voor f 0,95; H. Bulthuis: Krestomatio, een uitstekende en zeer uitgebreide bloemlezing voor beginners (was reeds jaren niet meer verkrijgbaar), geb. f 1,95, ing. f 1,50; H. Bulthuis: Robinsono Kruso (ook geschikt voor kinderen), gecart. van f 1,95 voor f 1,10; Vink: Kantokolekto, geill. liederenbundel met muziek van f 0,45 voor f 0,25, geschikt voor clubavonden, enz.

Vijf romans voor liefhebbers van detective-verhalen:

La Morea Perlo: Blua Sango; Iris; Sub la vitra Kupolo; La radianta lotuso; elk bijna 200 blz. Slechts enkele exempl. Per st. van f 2,- voor f 1,15.

Als speciale aanbieding „het boek van de maand": H. Bulthuis, La Vila Mano, uitvoerige roman, orig. geschreven in Esperanto, eenvoudige taal, stevig geb. van f 3,40 voor f 2,65.

Enkele gebruikte boeken voor examen B:

Shakespeare: Hamleto f 0,95; Goethe: Ifigenio en Taŭrido, geb. van f 2,35 voor f 1,15; Zamenhof: Fund. Krestomatio f 1,85; Puŝkin: La kapitanfilino f 0,65; Jung: Landoj de l' Fantazio, geb. van f 4,50 voor f 1,95.

Zend Uw verlanglijstje aan de leider van onze boekendienst, de heer H. A. Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom. Indien binnen 8 dagen geen antwoord, dan verkocht. Portokosten voor koper.

**INTERNACIAJ FERIAJ
KURSOJ EN HELSINGÖR**

Kiel vi povas konstati per la tiokoncernaj anoncoj en la marta kaj nuna numeroj de ĉi tiu organo, okazos ankaŭ ĉijare la Internaciaj FERIAJ Kursoj en Helsingör en Danujo. Ili okazos de la 25 a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto.

Jam pli ol 20-foje ĉi tiuj kursoj estas organizitaj de s-ro Friis el Aabyhøj. Je tiom, kiom vi partoprenis ankoraŭ ne persone ĉi tiuj kursoj kaj per tio ne jam spertis la perfektecon de la tieaj aranĝoj, aŭ ne jam aŭdis pri tio de viaj entuziasmigitaj gekonatoj, partoprenintaj foje tiuj kursoj, la multfoja sperto de s-ro Friis estos garantiaĵo al vi pri la plej bonaj aranĝoj, do: tre grava instigo al vi, ankaŭ foje partopreni tiuj kursojn!

La manĝaĵoj kaj litoj ĉiam havis la plej grandan laŭdon de ĉiuj, kiuj pasigis sian libertempon tie. La agrabla, internacia sfero ĉiam ravis ĉiun. Al tio kompreneble ankaŭ multe kontribuis la unika ebleco, kiun donas la instituto de Internacia Altlernejo. Ĉio povas okazi en la sama komplekso da konstruaĵoj, ĉirkaŭata de bela ĝardeno. Ĉi tiu ĝardeno invitas ĉiam denove al mallonga promenado dum la paŭzoj inter la manĝoj kaj lecionoj kaj donas belegan eblecon, dum bela vetero okazigi la diversajn lecionojn en la bonega libera aero.

Cetere ĉijare la partopreno de la kursoj havas tre apartan allogaĵon: Post la kursoj la gepartoprenintoj vojaĝos aŭtobuse al la U.E.A.-kongreso en Oslo. Post tiu kongreso oni revojaĝos per la samaj aŭtobusoj al Helsingör kaj de tie vagonare al Nederlando. - Cu vi povas imagi pli bonan kaj belan kombinaĵon ol ĉi tiun?

Jen, karaj gesamideanoj, - se vi ne jam decidis pri alia maniero de ia restado en Esperantujo en la venonta somero - tre alloga kaj konsiderinda ebleco, pri kiu vi petu senprokraste detalajn informojn, ĉu ĉe S. Friis, Ingemansvej 9, Aabyhøj, Danujo, ĉu ĉe J. Th. de Goeij, Luzacstraat 21a, Rotterdam-C., Nederlando, kiu lasta ĉijare organizos la karavanan vojaĝon al Helsingör.

En Leeuwarden mortis 84-jara s-ro J. H. Blekkingh, ano de nia tiea sekcio. Ni kore kondolencas liajn edzinon kaj parencojn.

En Den Burg (Texel) mortis 45-jara je 8/3 s-ro Th. Tiessen, ĝen. ano de L.E.E.N. Korajn kondolencojn al liaj edzino kaj parencoj.

KOMUNIKOJ DE LA LIBRO-SERVOJ.

| | Gld. | Belg. Fr. |
|--|------|-----------|
| Esperanta Krestomatia, dua eldono (ankaŭ por ekzameno A) | 1,95 | 24,- |
| Miru-Pensu-Miru, de P. Bennemann | 5,40 | 72,- |
| Kredu min, sinjorino!, de C. Rossetti | 5,40 | 72,- |
| La mondo ne havas atendejon, de M. Dekker | 2,50 | 30,- |
| La Rabistoj, de Schiller, trad. L. Zamenhof | 2,30 | 30,- |
| Fabeloj III, de Andersen, trad. L. Zamenhof | 2,30 | 30,- |
| Ariel, de J. E. Rodo (unua E.-verko eld. en Urugvajo) | | 50,- |
| Inter Sudo kaj Nordo, de F. Szilagyi | | 85,- |
| Vortoj kaj Esprimoj, de C. B. Zondervan | 1,15 | 15,50 |
| Pordoŝildo kun stelo kaj „Esperanto parolata" | 0,65 | 12,- |
| Fundamenta Krestomatia, de Zamenhof | 5,20 | 72,- |
| Aktualaj Problemoj de la nuntempa internacia vivo, de I. Lapenna | 5,- | 65,- |
| Retoriko, de I. Lapenna | 5,50 | 70,- |
| Invito al ĉielo, de D. Sayers | 4,50 | 55,- |
| Invito al ĉielo, de D. Sayers (broŝurita) | | 37,- |
| La hundo Kruso, de R. M. Ballantyne | 1,90 | 22,- |
| Modesta bukedo, de K. Jost | 1,50 | 24,- |
| Insignoj: por kravato | | 10,- |
| rondaj (broĉo aŭ pinglo) | 0,90 | 13,- |
| kvinpintaj (broĉo aŭ pinglo) | 1,10 | 13,- |
| pentagonaj (broĉo aŭ pinglo) | | 13,- |
| Esperanta kaj Flandra leonflagoj | | 15,- |
| Leterpaperoj (10 folioj kaj 10 kovertoj) | 0,50 | |
| Glumarkoj rondaj, kvadrataj, steloj, 100 | 0,50 | |

De boekendienst van L.E.E.N. levert U zolang de voorraad strekt Schidlof's woordenboek Esp.-Ned. en Ned.-Esp., geb., ruim 570 blz. van f 2,75 voor f 2,15.

Nog enkele exemplaren Bekn. woordenboek Esp.-Ned. en Ned.-Esp. van A. van Straaten, stevig gebonden, groot formaat en grote druk voor slechts f 4,35.

MENDU ĈE

Boekendienst L.E.E.N., Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, (giro 76915) Vlaams Esperanto-Instituut, Blankenbergse steenweg 72, Brugge (p.c.r. 3268.51)

**VIKTIMOJ DE LA AVARECO
(AVIDECO)**

„Mi aŭdis, ke oni ĵetis ĉe juvelisto Jansen ŝtonon tra la vitroj(n) kaj ke la ŝtelistoj forrabis la tutan enhavon de la elmontrejo." „Cu vere? Kaj ĉu oni sukcesis kapti (aresti) la kulpulojn (farintojn)?" La alia kapjesis. „Jes", li diris, „ili estis arestataj. La banditoj nome estis skotoj kaj ili revenis por preni sian ŝtonon, kiun ili ĵetis tra la vitroj(n)."

Du ĉarmaj junulinoj salutis unu la alian sur la strato per forta (sonanta) kiso. Du junuloj vidas ĉi tiun sceneton, post kio unu el ili rimarkas „Jen denove io, kio tute ne decas en la nunaj cirkonstancoj!" „Kio do?"; informigas la alia. „Ke virinoj faras la laboron de viroj", diris lia amiko.

Vul in: o, on, oj, ojn, a, an, aj, ajn:

Kar— Samidean—,

En la last— vint— mi lernis la internaci— lingv— Esperant— de Zamen-

te benoemen, maar hij weet niet, hoe men er behoorlijk op zitten moet."

Uitwerkingen van Vlaamse cursisten voor 20 Apr. aan V.E.B., Studanto, postbus 342, Brussel; van Nederlandse cursisten aan A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Z.

**INTERNACIAJ FERIAJ
KURSOJ**

okazos 25/7 - 1/8 1952 en Helsingör (Danujo)

Post la kursoj okazos aŭtobusa karavano por la gekursanoj al la U.E.A.-kongreso en Oslo

Petu tuj detalajn prospekton kaj informojn ĉe J. Th. de Goeij Luzacstraat 21a, Rotterdam-C.

Kopij voor het volgend nummer inzenden vóór 14 April s.v.p.

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA“

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst:
Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.
Penningm.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O, postrek. 34563.
Boekendienst, schr. cursus voor gevorderden en dipl. B: H Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915.
Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermewstr. 29, Badhoevedorp
Cefdel. U.E.A.: P. Moen, Schaarsbergenstraat 104, Den Haag, postrek. 79167.

KOMUNIKOJ DE LA ĈEFESTRARO

La ĝenerala kasisto ĝentile petas la sekciajn ĝekasistojn, kiuj ne jam pagis la kontribuon por la unua duonjaro, tuj ekagi por faciligi la laboron.
Ĉetere la ĝeneralaj ĝemembroj kaj ĝe-abonantoj estas afable petataj ĝiri la de ili ŝuldatajn sumojn en poŝtkonto 34563 de L.E.E.N. Fine de Aprilo ni forsendos poŝtkvitancojn por enkasigi la monon, aldonante ĝ. 0,30 por kovri la enkasigajn kostojn.

Dankon al la 200 ĝeanoj de L.E.E.N., kiuj ĝis nun per pago partoprenis en la baza kapitalo de la okazonta Univerŝala Kongreso en Nederlando. Ni pasis jam ĝ. 1575,- inter kiuj estas du pagoj de po ĝ. 250,-. Kie restas la aliaj membroj de nia asocio? La sekcioj imitu la belan ekzemplon de nia juna sekcio en Naarden-Bussum, kie oni cirkuligis leteron en la ankoraŭ malgrandnombra, sed entuziasma anaro. Rezultato: ĝ. 65,50!! Kiuj sekvos?

Aligis al L.E.E.N. kiel tria sekcio en Rotterdam la P.T.T.-grupo „Esperanto Estu Nia Celto“, kiu tuj kun la jam ekzistantaj grupoj „Espero“ kaj „Mercurio“ aktive partoprenos la preparan laboron por nia kongreso. Ni kore bonvenigas la novan sektion en nia mezo!

Sekcioj Leeuwarden kaj Hilversum kandidatigis kiel ĉefestraraninon anstataŭ s-ino S. Mabesoone-Visser, f-ino A. Hellinx.

PROPONOJ POR LA JARKUNVENO

En la januara numero ni jam sciigis, ke plialtigi de la kotizoj en la jaro 1953 verŝajne montrigos neevitebla. Ne timu, ke la ĉefestraro proponos duobligi la kotizojn! Komprenante, ke drasta plialtigi kaŭzus malfacilaĵojn al multaj anoj, ĝi proponas plialtigi ĝin ĝis nunajn kotizojn por la jaro 1953 per nur ĝ. 0,25. Laŭ tiu propono la kotizo en 1953 do estos por ĝen. anoj ĝ. 4,25; por sekciaj anoj ĝ. 3,75; por samhejmanoj ne ricevantaj la gazeton ĝ. 1,75; por senlaboruloj ĝ. 2,25 kaj por ĝejunuloj malpli ol 21-jaraj ĝ. 1,75.

La ĉefestraro proponas plialtigi la abonprezon je „Nederlanda Esperantisto“ de ĝ. 2,50 al ĝ. 2,75 kaj por eksterlandanoj al ĝ. 3,-.

Klarigo: La 31-an de dec. 1952 nia kontrakto kun la presisto finiĝos kaj ni antaŭvidas plialtigon de la preskosto en 1953. La eksterlandanoj krompagu ĝ. 0,25 pro la pli altaj afrankokostoj.

La ĉefestraro proponas, se la Univerŝala Kongreso okazos en 1953 en Amsterdam, aranĝi en tiu jaro ne propran kongreson, sed nur jarkunvenon.

Car la kongreso en 1952 okazos ne en Antwerpen sed en Rotterdam, la en la januara numero publikigita propono de la ĉefestraro koncerne duobligon de la kompenso, repagota el la ĝen. kaso al la sekciaj delegitoj, ne plu validas.

ASOCIA JARRAPORTO - LA ESTONTO ESTAS NIA - (fino)

Kongreso: Nia 18-a kongreso, la unua, kiun ni aranĝis en kunlaboro kun F.L.L.E., kaj kiu okazis 12/5 - 14/5 en Hilversum, bonege sukcesis kaj al la ĝeanoj de la L.K.K., kiuj modele aranĝis la tuton, ni ŝuldas koran dankon. Detalaj raportoj pri la kongreso kaj la jarkunveno aperis en la junia kaj julia numeroj de „Nederlanda Esperantisto“.

„Nederlanda Esperantisto“: De nia organo (komuna eldono de F.L.L.E. kaj L.E.E.N.) aperis en 1951 kiel kutime 11 grandformataj 4-paĝaj numeroj. F.L.L.E. faris enketon por sondi la opinion de la legantoj kaj sendis detalan raporton kun diversaj proponoj; tamen ne anoncis sin ĝis nun kunlaborantoj, por efektiviĝi la sugestojn. Siavice ankaŭ L.E.E.N. sondis la opinion de la legantoj, sed bedaŭrinde la reagoj estis nur malmultaj. El la sekciaj raportoj tamen montrigis, ke ĝenerale oni estas kontentaj pri la enhavo kaj aspekto. Pluraj anoj ŝatus aliformatan gazeton, sed event. ŝango estos ebla nur fine de 1952, ĉar ĝis tiam validos la nuna kontrakto kun la presisto. Manko de sufiĉa kunlaboro estis kaŭzo, ke la re-

KARAVANO DE L.E.E.N. AL OSLO

Evidentiĝas ke pluraj personoj volonte partoprenos la karavanon se ili povos resti pli longe en la nordo. Pro tio ni esploris la aferon kaj trovis la solvon en la formo de „la aŭtobuso“.

Estas preskaŭ nekredible ke ni trovis entreprenon kiu povas transporti nin al Oslo por fantazie malalta sumo. Por malpli ol ĝ. 100,-, aŭ por esti pli precize, por la sumo de ĝ. 97,50 ni povas vojaĝi al Oslo kaj ree. (Enkalkulita estas marvojaĝo de Frederikshavn al Oslo, tra la fama Oslo-fjordo!) La suprenomita sumo estas provizora, sed tre verŝajne ĝi ne plialtiĝos.

Ni ege esperas ke multaj Nederlandanoj partoprenos tiun ĉi eksterordinare malmultekostan vojaĝon. Ne estas eble ĉi tie doni detalojn. Vi povas peti ilin ĉe nia gvidanto (E. de Wolf, Joh. de Breukstr. 18, Haarlem). Ni sciigas nur, ke resti en Norvegujo/Danujo kelkajn tagojn plu, estos eble.

daktoro plurfoje devis oferi sian noktripozon, por regule kaj ĝustadate aperigi la gazeton.

Nederlanda Centra Komitato Esperantista: Car la financaj rimedoj estis modestaj, N.C.K.E., en kiu kunlaboris F.L.L.E., L.E.E.N., N.K., K.U.N.E., A.N.S.E. kaj No So BE, ne povis grandskale agadi. De la nova broŝuro „Esperanto de Wereldhulptaal“ ĝi presigis denove 20.000 ekzemplerojn. Krome estis represata „Esperanta Krestomatiko“. Al la sekcioj de la kunlaborantaj asocioj estis sendata cirkulero kun la celo rekomendi la starigon de lokaj kunlaborkomitatoj kaj pretigon de adresaro de spertaj prelegantoj. N.C.K.E. sin turnis al la P.T.T. kun la peto subteni en la int. kunveno de la Poŝta Unio la proponon pri dulingveco de la respondokuponoj. La nederlanda reprezentanto en tiu kunveno agos laŭ nia sugesto. La estraro sin turnis al la estraro de la skolta movado por esplori la eblon propagandi en skoltaj rondoj. La komunikoj de la radio-servo de N.C.K.E. aperis en la organoj de la kunlaborantaj asocioj kaj krome estis sendataj al la redakcioj de la radio-revuoj. Reprezentantoj de L.E.E.N. estis s-roj A.J. Kalma kaj F. Weeke. Kiel prezidanto funkciis s-ro A.J. Kalma; kiel sekretario s-ro J. Pouli.

Oficejo „Esperanto ĉe la Instruado“: Ankaŭ en la jaro 1951 la Oficejo regule kaj celkonscie daŭrigis la laboron. Dank' al financa subteno de fervoraj ĝeamikoj ĝi povis denove aranĝi bon-sukcesan porinstruistan kurson kaj daŭre eldoni „Mededelingenblad“ en kombino kun „De Esperantist“. Kvankam okulfrapaj efikoj ne estis montreblaj, lastatempe tamen kelka rezulto fariĝis antaŭpalpebla pro la kontakto de kelkaj membroj kun parlamentanoj. (Vidu la artikolon en la 4-a kolono sur pago 4-a de la antaŭa numero). Speciale la klopodado ĉe A.N.O.F. estis esperdona. Pro malsano de la ĝistiam direktoro s-ro P.W. Baas, ĉi tiu estis devigata ekŝiĝi je la 1-a de januaro.

Universala Esperanto-Asocio: La ĉefdelegito de U.E.A., s-ro P. Moen, regule ĉestis la ĉefestrarkunvenojn. Komitatoj estis s-roj P.W. Baas kaj F. Weeke, S-ino S. Mabesoone-Visser kaj s-ro W. Böttcher reprezentis L.E.E.N. en la kongreso en München. La ĉefdelegito kiel kutime voĉlegos la raporton pri 1951 en la jarkunveno en Rotterdam.

Ankaŭ en la jaro 1951 diversaj sekciaj estraroj unuoloke okupis sin pri la problemo kiel havigi agrablajn vesperojn al siaj anoj anstataŭ aranĝi publikajn kunvenojn kaj informi eksterstarantojn pri nia celado. La bedaŭrinde tro malmultaj aktivuloj, kiuj kvankam superŝutitaj per laboro iel trovis la tempon por plenumi sian ampleksan taskon, meritas nian sinceran dankon. Tamen ni povos atingi multe pli, se pli da personoj, kiuj ĝis nun ne aktivis, partoprenos en la laboro kaj dividos inter si la

Flandra Ligo Esperantista.

Postbus 342, Brussel.

Sekretario: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, Sint-Kruis.
U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.
Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Raghenoplaats 9, Mechelen.

Vi certe jam konstatis ke lastatempe ne plu aperis sciigoj pri la Komuna Kongreso en Antwerpen...

La komuna komuniko L.E.E.N.-F.L.L.E. jam informis vin pri la situacio!

Kredu ke ni kun doloro — same kiel la nederlandaj amikoj — decidis tiel: kiam la cirkonstancoj perfortas vin — tiu subita kaj daŭra malsano de la kongresa sekretariaro kaj tiu ne jam sufiĉe forigita kurzo-diferenco inter guldeno kaj franko — necesas submetiĝo, rezignacio, la specifa eco de la homoj kun racio kaj... simpla saĝo!

Ho, nur post funda esploro kaj senĉesa cerbumado, ne nur de ni sed ankaŭ fare de la L.E.E.N.-ĉefestraro, ni akceptis la solvon plej oportunan por niaj kunlaborantaj organizadoj.

Nu, ankaŭ vi kun miro estos konstataintaj la aferon kaj sentis seniluziigon: du sinsekvaj kongresoj ĉe la Beneluxa asocio! Apenaŭ du kunsidoj de la F.L.L.-L.K.K. kaj F.L.L.E.-L.E.E.N., poste konfirmataj de nia ĉefestraro, sufiĉis

por rezultigi la postulatan decidon!

Sed nu jes, nia kongreso devas sukcesi, kiel sukcesis la pasintjara en Hilversum: vi estu konvinkitaj F.L.L.E.-anoj, vi estu Esperantistoj, precipe nun kiam la cirkonstancoj trudis al via ĉefestraro kaj al tiu de L.E.E.N. decidon ne tiom ŝatatan.

Ni ĉetere komune ekzamenos en Rotterdam la direktivojn por la estonteco kiun ni igu fruktodona por nia kara F.L.L.E.

En nia kongreso okazos la kutima jarkunveno: proponoj por ĝi atingu la sekretarion antaŭ la 10-a de aprilo. Ja ne sufiĉas la trafaj, sed improvizitaj, sugestoj, kiujn ni spertas okaze de la dirita kunsido...

Do, antaŭen: nia liga kasisto estos la peranto por la aliĝo, pagoj, — pri kiuj vi trovos detalojn aliloke.

Gis en Rotterdam, T.v.G.

Plaatselijk Nieuws

F.L.L.E., Sekcio Antwerpen: Ekde marto la semajnaj kunvenoj okazas ĉiumarde en Diepestr. 44, de la 21-a ĝis la 23-a h. tuj post niaj ĉiumardaj kursoj, kiuj okazas samloke de la 19.30 ĝis la 21-a h., kun la celo, interesigi niajn ĝekursanojn pri nia sekcia vivo.

V.E.B., Afdeling Brussel: (Monico, Brabantstr. 2.) Onze agenda voor April werd als volgt samengesteld: 4/4 20-21 u. Cursussen A en B, waarna „enigmoj“; 18/4 20-21 u. Cursussen A en B, daarna inleidende lezing van de heer F. Debaene over „De Esp.-beweging in de strijd voor de vrede“, waarna debat; 20/4 Groepsuitstap door het zuidelijk gedeelte van de Brusselse bossen (slechts in geval van goed weder), waartoe iedereen welkom is!; 25/4 20-21 u. Cursussen A en B, waarna vertalingen uit het Nederlands.

V.E.B., Afdeling Gent: (secr. Pirenellaan 25). Het programma van de Woensdagavondvergaderingen werd als volgt vastgesteld: 5/3 Feestzitting; 12/3 Perfektiga kurso; 19/3 Varia vespero; 26/3 Spreekbeurt door de heer Vanneste. Op 5 Maart jl. vierde onze afdeling haar vijfjarig bestaan. De bondsvoorzitter, de heer de Brouwere, de bonds-

secretaris, de heer Maertens, en de heer De Bruyne uit Brussel, één der mede-heroprichters van de groep, wonden het gezellig samenzijn bij en spraken de hoop uit, bij de volgende feestzitting (tienjarig bestaan) een nog grotere uitbreiding van de afdeling te mogen vaststellen.

V.E.B., Afdeling Mechelen: (Meisjeslyceum, Veemarkt 37, 20 u.) De avonden in April werden als volgt vastgesteld: 2/4 Enigmoj aŭ gramatiko; 9/4 Inverse; 16/4 Lezing van de heer R. van Humbeek; 23/4 Varia vespero; 30/4 Lezing van dr Th. v. Gindertaelen.

Den Haag: La kunvenojn en aprilo ĝvidos diversaj personoj, kiuj pritraktos temojn certe interesajn, do nepre regule vizitu la kunvenojn! Ĝvidos 3/4 s-ino A. Scholten-ten Cate; 10/4 s-ino J. Ravestein-Basters; 17/4 s-ro L.J. Burger kaj 24/4 s-ro P. Moen.

Hilversum: Provizora programo: 3/4 Nederl. Sud-Afrika vespero memore al Van Riebeeck; 10/4 f-ino A. Middelkoop prelegos pri la libro „Sep Fratoj“; 17/4 la verkisto de l' monato: J. Baghy; 24/4 Prelego aŭ parolata gazeto.

FINANCA RAPORTO L.E.E.N.

| ENSPEZOJ | Budĝeto '51 | Jarkonto '51 | Budĝeto '52 |
|-------------------|------------------|-------------------|------------------|
| Kotizoj | g. 3000,— | g. 3250,11 | g. 3000,— |
| Donacantoj | 150,— | 96,08 | 90,— |
| Abonoj | 100,— | 105,07 | 120,— |
| Skriba kurso | 25,— | 34,15 | 25,— |
| Libro-servo | 100,— | | 100,— |
| Anoncoj | | 23,65 | |
| Rentumo ŝparkonto | | 53,56 | 75,— |
| Deficito | 100,— | | 260,— |
| | g. 3475,— | g. 3562,62 | g. 3670,— |

| ELSPEZOJ | Budĝeto '51 | Jarkonto '51 | Budĝeto '52 |
|--------------------------------|------------------|-------------------|------------------|
| Organo + redaktoro | g. 1900,— | g. 1844,34 | g. 2000,— |
| Kunvenoj ĉefestraro | 400,— | 326,35 | 400,— |
| Administra estraro | 325,— | 292,43 | 300,— |
| Repago sekciaj delegitoj | 180,— | 180,60 | 180,— |
| Kontribuo U.E.A. | 235,— | 235,— | 235,— |
| Ekzamena komitato | 15,— | 15,— | 15,— |
| N.C.K.E. | 30,— | 30,— | 30,— |
| Biblioteko | 25,— | 25,— | 25,— |
| Reprezentado Univ. Kongreso | 100,— | 100,— | 100,— |
| Oficejo „Esp. ĉe la Instruado“ | 50,— | 50,— | 50,— |
| Salono jarkunveno | 40,— | 40,— | 40,— |
| Distriktaj ĉefestraranoj | 10,— | 13,96 | 15,— |
| Teatra servo | 5,— | 1,65 | 5,— |
| Propagando | 100,— | 100,— | 200,— |
| Diversaĵoj | 60,— | 79,50 | 75,— |
| Profita saldo | | 228,79 | |
| | g. 3475,— | g. 3562,62 | g. 3670,— |

BILANCO 31 Decembro 1951

| Havaĵoj: | | Suldoj: |
|--------------------------|-------------------|-----------------------------------|
| Postĝirkonto L.E.E.N. | g. 2664,42 | Univ. Esperanto-Asocio g. 2126,50 |
| Kaso | 1,61 | Kongresa kaso 99,95 |
| Postĝirkonto som. kursoj | 25,— | Rezervo som. kursoj 644,33 |
| Sparkonto | 3553,56 | Propaganda kaso 435,95 |
| Debitoroj | 51,47 | Kreditoroj 519,80 |
| | | Kotizoj 1952 111,25 |
| | | Abonoj 1952 15,75 |
| | | Kapitalo |
| | | 1-1-'52 g. 2113,74 |
| | | profito 228,79 |
| | | 2342,53 |
| | g. 6296,06 | g. 6296,06 |

taskojn, kiuj fakte estas tro ampleksaj por esti farataj de nur kelkaj fervoruloj. Alportu vian helpon, por ke realigui nia devizo: La Estonto Estas Nia.

Aanmelding voor de op 22 Mei (Hemelvaartsdag) te Amsterdam en Groningen af te nemen examens voor 10 April a.s. bij de secr. mej. H. M. Mulder, Zilvermewstr. 29, Badhoevedorp.

la ĝen. sekretario.

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

PREMION akiris post n-roj 123-124: s-ro A. Marmenout, el Blankenberge, por VEB; kaj por LEEN s-ro E. J. Veldhuyzen, el Delft.

SOLVOJ.

125. rajdanto; glumarko; dentrado; kreskajo; faciligi; duobligi; bonodori; identigi; mastrino; necesujo; kriplulo; glaciaĵo; postlasi; rompebla; trablovo; malrekta; majonezo; unuanime; senmanka; fremdulo; incendio; plorgemi; manpremo; fresdata; elparoli; duonfali; invitito; fianĉino; insularo. Juneco ne scias, maljuneco ne povas.

126. *Horiz.*: sendependec; plan; vaks; grashepataĵ; kle; furor; levil; kapne; ornam.

Vert.: afiks; ellern; kripl; denask; krieg; palpebl; elkov; novjar; swing; elkraĉ; plumb.

127. KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 1. metoda listo(R); grandkvante(R). 2. tubero sur kverkofolio. 3. egale kiel aliaj; senenergi-a(R). 5. tuj(R). 7. uzdifekti; atentigi(R). 8. ludkarto(R). 9. ligna koloneto lude renversota; ekskluzive apartenanta(R). 11. fermita mano; korp parto(R).

Vertikale. 1. prepozicio; forkurante eviti(R). 2. ne povanta esti(R). 3. korp parto de rabobesto(R). 4. ekvilibro(R). 5. prepozicio; persono al kiu oni fervorege servas, kvazaŭ per kulto. 6. tratri(R). 7. diferenca(R); detranĉi membron(R). 8. laŭplaĉa decido(R). 9. iompostiome aliformigi(R). 10. naze-go(R). 11. havaĵo de virino kiu edziniĝas(R); korp parto(R).

128. EL DU FARU UNU, tiel ke la unuaj literoj formas proverbon.

LA ZOOLOGIA ĜARDENO EN ANTWERPEN

Mi ne kredas, ke inter miaj legantoj estas plenkreskuloj, similaj al tiuj estonaj samideanoj, kiuj mi (survoje al Budapeŝto) vidis infane manifesti sian ĝojon, ensaltantaj naive manfrape la bestĝardenon en Schönbrunn, dum la viena antaŭkongreso en 1929... Tamen, se iuj ne ankoraŭ vizitis tian ĝojon, ili okaze vizitu la Antverpenan. Ĝi tiuj, al kiuj tia institucio ne estas fremda, estos surprizitaj de la rava aspekto de tiu besteja parko, mezuranta 10 ha., admirinde priplantita kaj surkonstruita, kvazaŭ botanika ĝardeno (1500 orkideoj), kiu malkovrigas allogajn vidaĵojn kaj kie la animaloj estas prezentitaj en impona kadro, sugestianta jam por iuj specoj la naturan medion.

La monumenta enirejo en la koro de la urbo (ĉe la centra stacidomo) subtenas belan grupon de José Dupon, kiu konsistas el kamelo kun ĝia kondukan-to (3000 kg.). Flanke troviĝas la fest-palaco. La zoologia ĝardeno, kiun fondis antaŭ pli ol jarcento la Reĝa Societo de Zoologio, ja estas pli ol muzeo de vivantaj bestoj; ĝi konsistigas veran institucion de publika intereso, potenca ilon de scienca vulgariĝo kaj krome lokon de arta kaj monduma edifo kaj amuzo. En la festsalono ĝi okazis en 1928 la solena malfermo de nia internacia kongreso. Ĝi enhavas terason, promenejon kaj koncerthalon, vintan ĝardenon kun restoracio. La kverka plafono de la promenejo, la t.n. marmora salono, estas subtenata de 20 marmoraj kolonoj kun bronzaĵ sokloj kaj kapiteloj; la frisoj kaj paneloj estas faritaj el angla alabastro kaj la pavimo el blanka marmoro.

(fino en la venontu numero)

Ĉi sube bildo pri la parko de ekzotikaj remaĉuloj.

(klišo Antv. Zoologia Ĝardeno).

Vojaĝante karavane al Oslo vi evitas monperdon kaj zorgojn!



- Felanda* *maro*
- ke + funda; 2. tri + roso; 3. aso + nuno; 4. mil + nuko; 5. ja + lento; 6. io + ringo; 7. ni + varmo; 8. ni + lerta; 9. ilo + belo; 10. la + ponta; 11. ek + ideto; 12. ek + trudi; 13. mi + tasko; 14. li + mieni; 15. ci + valso; 16. en + grati; 17. ol + kreto; 18. ia + kardo; 19. po + skize; 20. si + fiago; 21. ĝi + virto; 22. ok + sangi; 23. se + utilo; 24. per + ajlo; 25. ol + regni; 26. li + besta; 27. ujo + rana; 28. da + benko; 29. kiu + mulo; 30. ni + genro; 31. por + lago; 32. ili + guti; 33. el + sorba; 34. por + temo; 35. tri + kalo.

| | | | | | | | | | | | |
|----|--|--|--|--|--|--|--|--|--|--|--|
| 1 | | | | | | | | | | | |
| 2 | | | | | | | | | | | |
| 3 | | | | | | | | | | | |
| 4 | | | | | | | | | | | |
| 5 | | | | | | | | | | | |
| 6 | | | | | | | | | | | |
| 7 | | | | | | | | | | | |
| 8 | | | | | | | | | | | |
| 9 | | | | | | | | | | | |
| 10 | | | | | | | | | | | |
| 11 | | | | | | | | | | | |

La solvojn sendu la nederlandanoj al S-ro G. J. Teunissen, Burg. Tellegenstr. 21 hs., Amsterdam-Z., kaj Flandra Ligo al Postbus 342 (Enigmoj), Brussel antaŭ la 20-IV-'52.

PRIMITIVA

En tre antikva manuskripto, Trovita en malluma kriptoj, Tre simple, per gotik-literoj, -Kaj inter piaj Di-aferoj- Legiĝas pri pedel' humila Sed orgenisto plej subtila, Je l'nom' belsona de Judokus, -Ad ridendum non est locus- Gajnante pene nur la panon, Li edukadis la infanon En ombro de la muzikilo, Kiel servanto ĉe l' blivio. Antifonaron li posedis, -Li de la patro ĝin heredis- Jarcent-malnovan dokumenton, De la kantaro monumenton. Nu, ĵutage lia filo Kun kolereta maltrankvilo Kaj ploretante ekkonfesis, Dum la postajon li karesis, Ke pro l' blivad; de l' pantalono Ve, eluziĝis la kotono. Jen patro ŝiris notfolion, Komencis tuj operacion, Kaj per plej tuaga pergameno Kaj per fortika lin-fadeno, Aranĝis pure fundamente La pantalonon diligente. Post kelkaj tagoj, laŭ la rit, Li kanti devis „l' Introit", Sed vane serĉas la notaron, Ektiras nerve al si haron, Ĝis li subite konsciigas Ke l' serĉataĵo ja troviĝas Sur pantalono de la ido, Gratanta sin kun stulta rido: „Metu vin, ho kar-infano Sur piedo kaj sur mano, Proksimiĝu al orgeno, Tuj finita estos peno!" Kaj - la knab' estis obea- Tuj leviĝis cel' trofea; Kaj grinante per la dentoj, Kaj ŝvitante dum momentoj, Tenis knab' per inda belo La postajon al ĉielo, Kontraŭ de la patr' okulo. Kaj ekkantis laŭ regulo Nia klera Majstro Judokus: Quam terribilis est locus, Iste... " Ja timiga, Di, Estis tiu lok' al li!

Rerakontis: TYNEVERUM.

BIBLIOGRAFIO

„Rui Barbosa" (1849-1923), de Fernando Nery. Biografia Esao. El la portugala lingvo tradukis Jozefo Joels. Eldonis: Domo de Rui Barbosa, Rio de Janeiro, 1949. - 293 p., 15 x 22.5. Prezo ne indikita.

„Kavaliro de la justo kaj de la libero, malamiko de tiraneco kaj de regado de la kruda forto" la aŭtoro nomas tiun grandan brazilan juriston kaj politikiston.

Nelacigeble atakis Rui Barbosa la arbitrojn de la diktatoroj, sentime li protestis per la tuta forto de sia elokvento kontraŭ ofendoj de la rajtoj de aliuloj, laŭte proklamis sian kredon pri la povo de la racio kaj de la vero, neŝancelige predikis disciplinon kaj nepran respekton por la leĝo. Sub la imperia reĝimo li batalis en la unuaj linioj por aboli la sklavecon. La Imperio falis. En la novnaskita Respubliko, „kies cerbo kaj animo li fariĝas", ni retrovas lin kiel membron de la Provizora Registaro. Ankaŭ ekster la propraj landlimoj li famiĝis pro siaj justam kaj kapablo: elektita Honora Prezidanto de la Unua Komisiono ĉe la Packonferenco en Hago 1907, li akceptigis la egalrajtecon de ĉiuj regnoj ĉe la elekto de la pli gravaj postenoj en la Kortumo.

Malkonstanta estas tamen la favoro de la potenculoj: jen liaj honesto kaj kompetento kondukos lin al plej altaj postenoj, jen kalumnioj kaj envioj subfosos lian influon kaj rejetos lin en la vicajn de senpova opozicio. Sed fidela li restos al sia rektalina kondutregulo, senkompatate li brulstamps ĉiujn ekscesojn sur sia ŝatata batalkampo: gazetaro, podio, juĝejo, parlamento. Nek minacoj, nek danĝeroj, nek ekzilo lin silentigos; samkiel vanos ĉiu provo subaĉeti lin per honorigoj aŭ monaj rekompencoj.

Kvindek jaroj da seninterrompa lukto ne rezultigis la definitivitan venkon de la leĝeco: ĉu do mirige, ke li fine sentis naŭzon al la landa politiko?

Jen kiel la nobla figuro de R. B. elpaŝas el la verko: homo intermite glorata, sed kiun ofte nigrigas la homa malico.

Eldonis la verkon la „Domo de Rui Barbosa" kiel kontribuon al la solena memorigo de tiu eminenta ŝtatisto okaze de la centa datreveno de lia naskiĝo. Ke oficiala institucio, komisiita por la gvidado de la jubileaj literaturaj memorigoj, vicigis ĉi tiun eldonon inter la oficialaj publikigoj, estas plia honoro por la brazilaj samideanoj, kiuj ne la unuan fojon sukcesis interesigi aŭtoritatojn pri Esperanto.

Se la legado ne ĉiam estas facila por alilandanoj, ĉe kiuj sufiĉa scio pri la brazila historio ne estas memkomprenebla fakto, ĝi tamen estas vere instrua, malkaŝante la perfortojn de malpura politiko — ne gravas, kian logan nomon ĝi skribas kape de sia programo, — forlasinta la rektan vojon de la leĝeco.

Eble la stilo efikas tro pompa al niaj oreloj, sed tion sendube klarigas la komprenebla strebado de la tradukinto kiel eble plej fidele esperantigi la entuziasmajn laŭdegojn de la biografio kaj la oratoran vortimpeton de R.B. mem en la multaj citaĵoj el liaj verkoj.

La lingvo estas bona. Mirigas tamen la plurloke uzita „unun", kaj kelkaj derivaĵoj en kiuj mal- ne signifas pli ol simplan neadon (25: malpagi; 27: maltuŝi; 46: malsekvi; k.a.)

La libro, kun siaj dek tutpaĝaj foto-

GERMANA RAKONTO

En Germanujo, la karthudo pokero estas severe malpermesita, senkompatate punata; tial la polico regule esploras invadas la trinkejojn por surprizi la kul-pulojn.

Iun tagon policisto kredis fari bonan kaptan. Penetrante en la malantaŭ-salono de kafejo, li ekvidis ĉe tablo kvar virojn, kiuj interrompis la ludadon ĉe lia eniro.

„Jen, mi kaptis vin", ekkriis la reprezentanto de la leĝo. „Vi pokeris!"

„Ĉu mi", la unua diris kun angela mieno, „ludis pokeron? Mi ĉi tie ek-sidis nur por iom babil, atendante mian amatineton, kiu malfruas kiel ĉiam..."

„Mi estas fremdulo", klarigis la dua, „kaj vere tute hazarde troviĝas ĉi tie. Mi ĵus mendis sandviĉon por iom kvietigi mian malsaton..."

„Koncerne min", la tria asertis, „mi ĵus envenis. Mi atendas la proksiman buson. Cetere ĝi alvenos post du-tri minutoj kaj mi nepre devas rapidi!" Kaj li forkuris antaŭ ol la policisto povis iel bari al li la vojon.

Kolera nun, la policisto alparolis la kvaran: „Nu vi, vi ne neu. Vi ludis pokeron! Vi ankoraŭ havas la kartojn en la mano!"

Kaj la kvara klarigis, kun mano sur la koro: „Mi, sinjoro policisto, kiel vi povas imagi tion! Kun kiu do?"

CENTRO DE ESPLOROJ KAJ DOKUMENTADO

Sabaton la 8-an de marto okazis en R'dam kunveno, aranĝita de la loka kunlaborantaro, en kiu d-ro I. Lapenna post la paŭzo raportis pri la ĝis nun faritaj laboroj de C.E.D., pri kies starigo ni informis en la februara numero.

La Centro sendis al diversaj gravaj neesperantistaj institucioj (U.N., U.N.E.S., K.O., Carnegie, k.a.) dokumentojn pri niaj lingvo kaj movado, redaktitajn en la oficialaj lingvoj de tiuj organizaĵoj, kun indiko, ke la originalo aperis en Esperanto. La dokumentoj informas pri la ĝisnuna stato de la disvastigo de la internacia lingvo. La Centro disponas pri ĉ 100 kompetentaj kunlaborantoj en diversaj landoj, inter kiuj pluraj universitataj profesoroj, kiuj kontribuas per altnivelaĵ artikoloj pri la lingvaj problemoj de la fakoj, pri kiuj ili estas kompetentaj kaj tradukas artikolojn de la Centro por aperigo en nacilingvaj gazetoj kaj revuoj. Bonaj rilatoj de la kunlaborantoj kun naciaj gazetoj estas pro tio ege necesaj. Bedaŭrinde la nuna situacio ofte estas tia, ke oficialaj kaj kulturaj instancoj kaj revuoj estas malfacile alireblaj, kiam temas pri Esperanto. La kaŭzo estas i.a. la fakto, ke en antaŭa tempo multaj esperantistoj mem pro troa dilettantismo faris gravajn erarojn. Por informi eksterstarantojn pri la praktika valoro de Esperanto oni devus disponi i.a. pri fidinda statistiko koncerne la servojn, faritajn de la delegitoj de U. E.A., per kies helpo oni ofte atingis rezultatojn, kiuj sen Esperanto ne estus akireblaj.

ESPERANTO-KURSO POR SEMINARIANOJ

La Oficejo „Esperanto ĉe la Instruado" organizos por ĝelernantoj de seminarioj por ĝinstruistoj Esperanto-kurson en la konferencujo „Weltvreden" en Kerk Avezaath apud Tiel.

Komenco je lundo 21/VII je la 14-a horo, fino je sabato 26/VII je la 14-a. Kursgvidanto estos S-ro J. U. Hommes, membro de la Ned. Esp. Ekz. Komitato, instruisto en Apeldoorn.

Ne nur tiuj ĝelernantoj, kiuj jam studis Esperanton, sed ankaŭ tiuj, kiuj ankoraŭ ne komencis la studadon, povos partopreni (eventuale oni aranĝos du kursojn: unu por komencantoj kaj unu por progresintoj). La kurskoto estas (inkluzive de loĝado kaj manĝoj) nur g. 10,-! Ankaŭ eksterlandaj ĝeseminarianoj esperantistaj estas bonvenaj. Aligo ĉe la Oficejo: J.P. Sweelinkstr. 2, Deventer, Nederlando.

reproduktaĵoj, estas bele presita sur bonega papero. Ĝi trovi la akcepton kiun ĝi fakte meritas.

Fr. C.

„Niko kaj Nina", postkursa legolibro originala, de J.F. Berger, eld. Limburger Vereinsdruckerei, 70 p. Prezo 2,40 gm. Recenzota.

„Kiel aŭtodidakto al pedagogia scienco", de K. Wiczorek, eld. Limburger Vereinsdruckerei, 40 p. Prezo 1,80 gm. Recenzota.

„La skulptaĵoj sur la Vigeland-ponto", de K. S. Kjaer kun teksto trad. en Esperanton de R. Bugge-Paulsen kaj fotoj de Johannes kaj Jan Stage, eld. Abels Kunstforlag, Oslo, 42 p. grandformata. Prezo n. kr. 8.

KASKONTRŬLO

La subskribinto kontrolis la financon administradon de la ĉefestraro de L.E.E.N. pri la jaro 1951a, kaj trovis ĉion en bona ordo.

Li aprobis la bilancon je la 31-a de decembro 1951 same kiel la jarkonton pri la jaro 1951a, kiu montras profitan saldon de g. 288,79. Li proponas malsarĝi la kasiston pro lia financa administrado.

La kalkulkonsilanto: P. v. Geel.

ANONCETOJ

Deziras korespondi pri literaturo kaj kolektas poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn 16-jara gimnaziano s-ro Hiroshi Ukino, 34 Ikuta, Satanda, Amagasaki City, Japanujo.

Deziras korespondi kaj intersanĝi poŝtmarkojn (neuzitajn seriojn), gazetojn pri sporto, fotografio, kino, s-ro Georgi Valkov, str. Ivajlo 68, Burgas, Bulgarujo.

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond Postbus 342 — Brussel en Ned. Esperantisten-Vereniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. (Ned.)

Drukkerij Krol, Hoofstraat 31, Uithuizen (Ned.)